Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo lundon la 21-an de januaro 2019 per Skype.
(Protokolo aprobita la 18-an de februaro 2019)

Partoprenis:
Amelie Matt en Tromsø
Anne Karin Bondhus en Bryne
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Lars Sandbakk en Sandnes
Mario Machlik en Tromsø

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 3-an de decembro
Aprobita.

2. Ekonomio
Skagen Vekst : kr 59 478,- (60 698,-)
Skagen Høyrente : kr 133 806,- (133 577,-)

3. Jarraporto, jarkalkulo 2017
Anne Karin fartas pli bone kaj provos finfari la jarkalkulon dum tiu ĉi semajno kaj sendos al estraranoj por eventualaj komentoj. Poste Mario skribos kelkajn frazojn kiel resumo. La limdato por la venonta numero de Norvega Esperantisto estas la 25-a de januaro.

4. Landa Kongreso 2019
La klubo en Tromsø decidis, ke la kongreso okazos la 1-an kaj 2-an de junio (sabate kaj dimanĉe) en la Sporta Gimnazio de Tromsø (*Norges Toppidrettsgymnas*) La ekskursa tago estos antaŭ la kongreso, la 31-an de majo. La proponoj estas ŝipveturo en la insularo apud Tromsø, aŭ/kaj vizito al *Polarmuseet*. La kongresanoj povus tranokti en hotelo kiun ni rezervos por ili aŭ private ĉe membroj de la klubo.

5. Datoj por la venontaj estraraj interkonsiliĝoj
Venontfoje ni interkonsiliĝos lunde, la 18-an de februaro je la 19.30.

6. Eventualaĵoj
Lars ricevis entuziasman retleteron de *Hamsunsenteret*, al kiu li aŭtune sendis ekzempleron de la romano « Viktoria » tradukita en Esperanto. Nun li volas trovi pli da informoj, kiuj rilatas al Hamsun kaj Esperanto. Ni povus sekvi tiun bonan ekzemplon por oferti ankaŭ al aliaj muzeoj, centroj tradukitan norvegan literaturon. Ĉu ni havas liston pri norvega literaturo tradukita al Esperanto ?

La interkonsiliĝo daŭris 20:00 - 20:52
La venonta interkonsiliĝo okazos la 18-an de februaro 2019.

Raportis Mario Machlik